

Maurice
CRANSTON



***IMAGA***
***DIALOGO***

# MARKS/BAKUNIN



**Esperantigis**
**D.C.**

SAT-Broŝurservo * "Laŭte!"
Cercle espérantiste de l'Agenais
F 47340 Laroque Timbaut * 1982 * 4 FF

## En la sama serio

* Anarkio kaj organizo (Malatesta)
* La Bazoj de Anarkiismo (Balkanski)
* Durruti, simbolo de la hispana revolucio (Pario)
* Etiko I (Kropotkin)
* La Forto de la Fortaj (J.London)
* Homa animo sub socialismo (O.Wilde)
* Historia materiismo - Ĝeneralaj konsideroj pri la problemo de organizado (Pannekoek)
* La Parlamentisma Iluzio (C.A.Laisant)
* Inter Sovetaj Popoloj (Diksztejn)
* La liberecana penso (citaĵoj)
* Liberecanaj vivkonceptoj (Fontaura) - En anarkista socio, kiel kondutos la individuo ? (Jean Grave)
* Memvola Servuto (La Boétie)
* Naciecaj problemoj (Roza Luksemburg)
* Nia Individuismo (E. Armand)
* Neperforta revolucio (T.Ebert)
* Parabolo pri la cisterno (E.Bellamy)
* La Rajto de Pigro (Paul Lafargue)
* Politika Neperforto (M.A.N.)
* La Piramido de l'Tiranismo (Nieuwenhuis)
* Revolucia registaro - Anarkista agado en la revolucio - La Pariza Komunumo (Kropotkin)
* Sindikatismo - Sovetoj (Pannekoek)

* Jenaj verkoj de Han Riner :
  - La Aperoj de Ahasvero
  - Individuismo en Antikveco
  - Individuisma Manlibreto
  - La Kvina Evangelio
  - La inĝenia hidalgo Miguel Cervantes
  - Veraj Interparoloj de Sokrato
* Jenaj tekstoj de E.Lanti :
  - Vortoj de Kamarado E.Lanti
  - La laborista esperantismo
  - El Verkoj de Lanti (I kaj II)

****

Plena detala broŝurlisto estas ricevebla kontraŭ 1 irpk. al Cercle espérantiste de l'Agenais
F 47340 Laroque Timbaut

## Enkonduko

Estas sciate, ke la rilatoj inter Marks kaj Bakunin estis plej tiklaj. Ankoraŭ nuntempe la partizanoj de unu aŭ alia el tiuj du elstaraj fakuloj pri socia demando - kaj mi ja inkludas inter ili la plej objektivecajn - estas en siaj taksadoj ĝenataj de la difektoj (komplementoj de iliaj kvalitoj) de tiuj du vere esceptaj homoj.

Bakunin, jen la uragano. Agadhomo tia, kia Diogeno demonstranta marŝante la movadon, ĉia okazo estas al li oportuna por apliki teoriojn, je kiuj li estas iafoje nur graveda, sed kiuj, antaŭitaj de ekpraktiko pli-malpli empiria, iom post iom riveliĝas valoraj, tamen neniam sukcesante sin trudi en la socia fakto.

Marks, jen la kabineta homo. Pensulo majstre asimilinta la verkojn de antaŭuloj, kiujn li de tiam eklipsis, li havas super Bakunin la avantaĝon, ke li rekomendas eksperimenton, kiu nenion novigas, kiu nur translokas la regpovan eksperimenton. La socia demando estos por li solvita la tagon, kiam la burĝaro, rabinte de la nobelaro la aŭtoritatan sceptron, vole aŭ devige rezignos sian superregadon por cedi la lokon al konscia proletaro kapabla gvidi la homaron al socialismo.

Ĉu oni povas tamen aserti, ke liaj proponoj - pli facile realigeblaj ol tiuj de Bakunin, ĉar ili nur transŝanĝas la aŭtoritatan principon igante ĝin profito por iu klaso domaĝe al alia - respondis, en sia aplikado sur grava vasteco de la planedo, al la esperoj de sia iniciatinto ?

La homo politika, partia, jese respondos, ja. La sociologo, la senpartia observanto estos almenaŭ dubema. Kaj la neganto de l'aŭtoritato facile povos helpe de pruvoj denunci la malfortojn de la marksa sistemo (aŭ de ties derivantoj), kiu nuntempe pludaŭrigas - ilin iafoje pligravigante en la nacioj, kie ĝi ĝuas senliman regpovon -

la egajn difektojn, kiujn Marks (samkiel Bakunin) denuncis koncerne la farojn de la burĝa ŝtato.

Dum radio-elsendo el B.B.C. en Londono en oktobro 1962, sperta sociologo, Maurice Cranston, kiu perfekte konas sian temon - kaj tio ĉi ne estas eta laŭdo - imagis dialogon inter Marks kaj Bakunin dum ilia renkontiĝo en Londono la 3an de Novembro 1864.

En tiu parolado transsendita al milionoj da aŭdantoj kaj pri kiu oni gratulu la anglan radio-servon, la aŭtoro klopodis restarigi, laŭ iliaj apartaj tezoj disvolvitaj en iliaj respektivaj verkoj, verŝajnan diskuton, kiu rivelas rimarkindan erudicion. Oni tie ĉi retrovos, majstre portretitaj la du homojn, kiuj elstaris en sia epoko sur la socia kampo, en akra debato pri tiu temo eterne aktuala : Ĉu oni fidu la liberecon ? Aŭ male, ĉu la aŭtoritato estas nepre necesa ?

Louis Louvet.

Teksto de Maurice Cranston
disaŭdigita en 1962 el la B.B.C. en Londono

***

Bakunin. - Mia kara Marks, mi povas oferi al ci tabakon kaj teon. Mi tamen timas, ke mia gastigo estos senluksa, tiom malriĉigita estas mi nuntempe.
Marks. - Koncerne min, mi daŭre estas malriĉa, Bakunin. Ĉiuj formoj de la malriĉeco estas de mi konataj kaj tio ja estas la plej malbona el la malbonoj.
B. - La sklaveco estas la plej malbona el la malbonoj, Marks, kaj ne la malriĉeco. Ĉu tason da teo ? Mi ĝin tenas ĉiam tuj servota. En Londono la ĉambroluantinoj estas tre komplezemaj; kiam mi vivis en Paddington Green, deĵoris servistino, Gracia ; ŝi grimpis kaj descendis la ŝtuparon la tutan tagon kaj parton de la nokto kun varma akvo sukerita.
M. - Se la laborista klaso en Anglio suferus penigan ekzistadon, ĝi estus la unua por ekribeli.
B. - Ĝi devus... sed ĉu ĝi tion faros ?
M. - Tion faros ĝi, aŭ la Germanoj.
B. - La Germanoj neniam ribelos. Ili mortos antaŭ ol povi ĝin fari.
M. - Tio ne estas demando pri nacia temperamento, Bakunin. Ĝi estas demando pri industria progreso. Tie, kie la laboristaro posedas klaskonscion...
B. - Ne ekzistas klaskonscio tie ĉi, en Anglio. La servistino pri kiu mi parolis antaŭ momento estis absolute obeema, rezignaciinta, humila. Vidi ŝin tiel ekspluatata malĝojigis min.
M. - Laŭ mia kompreno ci mem ne preterlasis tiri profiton el ŝi.

B. - Ekspluatado en Londono ĉie regas. En tiu urbego plenplena de mizero, en tiuj mallumaj kaj malpuregaj stratetoj neniu aŭdacus starigi barikadojn. Ne, Marks, tie ĉi ne estas la loko de socialisto.
M. - Tamen ĝi estas preskaŭ la sola loko, kie ni estas allasitaj. Mi jam vivis tie ĉi dekkvinon da jaroj.
B. - Domaĝe, ke ci ne konis min en Paddington Green, mi tie restis ĉirkaŭ dek du monatojn. Legante cian leteron, en kiu ci anoncis al mi cian viziton, hieraŭ, mi rememoris, ke niaj vojoj ne kruciĝis de post foraj tagoj en Parizo.
M. - Ci devis forlasi Parizon en 1845.
B. - Ne, en aprilo antaŭ la Dresdena insurekcio, kiam mi falis, se tiel diri, inter la manojn de l'malamiko. Ili tenis min en prizono dum dek jaroj, poste mi estis deportita en Siberion. Kiel ci ĝin scias, mi sukcesis forkuri kaj atingi Londonon. Nun estas al mi eble vivi en Italio. Mi reiros al Florenco la venontan semajnon.
M. - Tre bone, ci fine povos migri.
B. - Mi konstante migras. Mi ne estas kiel ci diskreta revoluciulo. La kronitaj kapoj de Eŭropo trafis min moviĝanta.
M. - La kronitaj kapoj de Eŭropo ankaŭ min elpelis el diversaj landoj. Kaj malriĉeco trudis al mi forlason de pluraj lokoj.
B. - Ha, malriĉeco ! Mi ĉiam estas senmona, konstante pruntepetanta miajn amikojn. Mi vivis grandan parton de mia vivo per mono pruntita, krom en prizono. Kaj mi estas kvindekjara. Sed mi neniam pensas pri mono ; por la burĝoj taŭgas tiaj pensoj.
M. - Ci havas ŝancon. Ci ne havas vivtenendan familion.
B. - Ci devas scii, ke mi vivis kun virino en Polio, sed certe estas, ke mi ne havis infanon. Ankoraŭ teon ? Da ĝi reprenas mi. Sen teo Ruso vivi ne povas.

M. - Kaj vi estas multnombraj, vi, Rusoj, nobelaj Rusoj, por esti preciza. Se konsideri vian temperamenton, malfacile devas esti por vi penetri la proletaran mensostaton.
B. - Pri tio ĉi kion ci mem pensas, Marks ? Ĉu ci ne estas la filo de bonhava burĝo, de advokato ? Kaj cia edzino, Frelin von Westphalen, la filino de barono von Westphalen kaj fratino de la ministro pri internaj aferoj en Prusio ? Konfesu, ke tio estas ja dubinda pleba origino.
M. - Socialismo bezonas same la intelektulojn kiel la laboristan klason. Krome mi suferis persekutadon kaj malsaton dum la akraj ekzilaj tagoj.
B. - La noktoj en prizonoj estas ankoraŭ pli longdaŭraj. Mi tiel kutimiĝis al malsato, ke mi preskaŭ ne plu ĝin sentas.
M. - Mi kredas, ke la plej granda malbono estas vidi siajn infanojn konsumiĝi pro nutromanko.
B. - Jes, ankaŭ mi tion kredas. Esti mem kondamnita al morto ne estas tiel aflikta kiel oni povus pensi. Iasence mi trovis la aferon iel amuza.
M. - De kiam mi restadas en Londono, mi vivas en meblitaj ĉambroj malpuraj kaj malkaraj. Mi devis pruntepreni kaj kredite aĉeti ; mi lombardis vestojn por pagi la luprezon. Miaj infanoj estas edukitaj tiucele : respondi, ke mi forestas, kiam kreditoroj sin prezentas. Ni ĉiuj, mia edzino kaj mi, miaj infanoj kaj maljuna domservistino vivas kunpuŝitaj en du ĉambroj malbone meblitaj. Mi provas labori sur la sama lama tablo, kiun uzas mia edzino por kudri dum ludas miaj infanoj, kaj ni restas horojn sen lumo pro ŝparemo. Mia edzino estas ofte malsana, kaj ankaŭ miaj infanoj, sed mi evitas voki kuraciston, ĉar mi ne povus lin pagi nek aĉeti la medikamentojn, kiujn li preskribus.

B. - Sed, mia kara Marks, kaj cia kunlaboranto Engels ? Mi ĉiam kredis...
M. - Engels estas tre malavara, sed ne ĉiam estas al li eble min helpi. Kredu min, mi suferis ĉiaspecajn malfeliĉojn. La plej grava okazis antaŭ ok jaroj, kiam mortis mia sesjara filo Eduardo. Francis Bacon diras, ke la gravaj homoj estas tiel absorbe okupitaj per multnombraj aferoj, ke ili sukcesas supervenki sian aflikton, kiam ili suferas similajn perdojn. Mi, Bakunin, ne estas unu el tiuj gravaj homoj. La morto de mia filo tiel profunde impresis min, ke hodiaŭ mi same sentas la doloron kiel en la tago de lia forpaso.
B. - Se mono mankas al ci ĝis tia grado, Aleksandro Herzen abunde ĝin posedas. Mi ofte petis de li helpon, mi ne vidas kial li ne povus helpi ankaŭ al ci.
M. - Herzen estas burĝa reformisto el la speco plej supraĵa. Mi ne ŝatas min turni al certaj homoj.
B. - Se ne estus Herzen, via "Komunista Manifesto" ne estus tradukita rusen, antaŭ du jaroj.
M. - Malfrua traduko, sed pri tio mi dankas al ci. Eble ci nun intencus traduki mian "Mizero de la filozofio".
B. - Ne, kara Marks, mi ne ĝin lokas apud ciaj plej grandaj verkoj. Krome, ci estas tro akra kontraŭ Prudhon.
M. - Prudhon ne estas socialisto. Li estas nescianto, tipa aŭtodidakto el malalta klaso, parvenuo en ekonomiko, kiu fanfaronas pri kvalitoj, kiujn li ne posedas. Lia ĉarlatana parolemo pseŭdoscienca estas vere netolerebla.
B. - Mi konsentas, ke Prudhon estas iom mensbarita, sed li estas centoble pli revolucia ol ĉiuj doktrinaj kaj burĝaj socialistoj. Li kuraĝas sin deklari ateisto. Kaj precipe, li batalas por la libereco kontraŭ la aŭtoritato, por socialismo, kiu estus plene libera de ĉia registara reglamentado. Prudhon estas aŭtenta

anarkiisto.
M. - Alivorte, liaj ideoj estas tre similaj al la ciaj.
B. - Mi ricevis lian influon, sed miaopinie Prudhon ne iras sufiĉe malproksimen. Li hezitas antaŭ la agado kaj perforto. Li ne komprenas, ke la detruado estas en si formo de la kreado. Mi estas aktiva revoluciulo, Prudhon estas teoria socialisto, kiel ci.
M. - Mi ne komprenas, kion ci volas diri per teoria socialisto, Bakunin, sed mi riskas aserti, ke mi estas tiom kiom ci aktiva socialisto.
B. - Mia kara Marks, mi subdiras nenion, kiu estus al ci ne respekta. Male, mi memoras, ke ci estis elpelita for de la Bonno-universitato pro duelo je pistolo ; mi do konsentas, ke ci estus utila soldato por la revolucio, se ci povus kelkfoje eskapi el la biblioteko de la Brita Muzeo por translokiĝi sur la barikadojn. Kiam mi nomas cin teoria socialisto, mi volas diri, ke ci estas teoriisto pri socialismo, kiel estas Prudhon. Mi ne povus verki filozofian traktaton tiel gravan kiel la cian aŭ tiun de Prudhon. Mi ne transpasas la limojn de la pamfleto.
M. - Ci estas bonedukita homo. Ci ne povus skribi por la vulgaruloj, kiel faras Prudhon.
B. - Efektive, vere estas, ke Prudhon estas la filo de kamparano kaj aŭtodidakto, dum estas mi la filo de granda bienhava proprietulo. Mi divenas kion ci pensas, Marks : ke studis mi la hegelan filozofion en la universitato de Berlino.
M. - Ci ne povus havi pli bonan preparon. Kaj de socialisto kun cia kulturo oni rajtus atendi ion plian ol teni fusilon sur barikado aŭ ekincendii la Dresdenan Operejon.
B. - Ci flatas min, Marks. Ne mi ekincendiis la Dresdenan Operejon. Krome, mi ne estis en Dresdeno kiel anarkiisto. Ci devas memori, ke la koncernaj faktoj estis jenaj : la saksa

Dieto estis voĉdoninta federan Konstitucion por Germanio. La Saksia reĝo nepre ne volis ion aŭdi pri ia ajn unuigado kaj li disigis la Dieton. La popolo sentis sin insultita kaj en Majo de la sama jaro, ĝi starigis barikadojn en la stratoj de Dresdeno ; la partiestroj de la Parlamento, kiuj evidente estis liberalaj burĝoj, invadis la konsistorian palacon kaj proklamis provizoran registaron.
M. - Mi precize pensas, ke tia afero ne povis inspiri homon kiel cin, tiel kontraŭan al ĉia formo de registaro.
B. - La popolo ne sin armis kontraŭ la reĝo, ĝi simple ekribelis. Kaj tio jam prezentas ion valoran. Mi hazarde troviĝis en Dresdeno kaj metis min en la servon de la revolucio. Antaŭ ĉio mi konis la militan strategion, kaj la liberala saksa burĝaro ĝin komplete nesciis. Kun du polaj oficiroj mi formis la stabon de la ribelantaj fortoj.
M. - Improvizitaj soldatoj, ĉu ne ? Tamen ci ne estis feliĉa.
B. - Ne, tio daŭris nur kelkajn tagojn. La reĝo ricevis prusajn helpotrupojn kaj ni devis evakui Dresdenon. Kiel ci diris, kelkaj el niaj homoj ekincendiis la Operejon. Estis mi partizano eksplodigi la konsistorian palacon kun ni interne, sed en tiu momento la Poloj malaperis kaj la lasta el la saksaj liberaluloj volis transloki sian registaron al Chemnitz. Mi ne povis dizerti kaj mi estis kaptita. La urbestro de Chemnitz surprizis nin ĉe l'freŝa faro.
M. - Do, ci, Bakunin, ci estis enkarcerigita pro la afero de la germana unuiĝo kaj pro tio, ke ci perforte favoris la starigon de liberala burĝa registaro. Konfesu, ke kuŝas en tio certa ironio.
B. - Mi povus pro tio esti mortpafita. Sed la sperto faris el mi alian homon ; mi certe profitis de cia ekzemplo. Ni ne same opiniis en 1848, sed nun mi konfesas, ke ci iris

multe pli malproksimen ol mi. Mi konsentas, ke la famo de la revolucia movado eŭropa ebriigis min, kaj mi estis pli allogita de la negativa flanko de la revolucio ol de la pozitiva.
M. - Mi ĝojas kun ci pro tiu decido tiri profiton de la jaroj da devigata pripenso.
B. - Tamen, estas punkto pri kiu ci eraris kaj pravis mi. Kiel Slavo, mi volis la liberigon de la slava popolo el la ĝermana jugo, kaj deziris ke ĝi okazu pere de revolucio, nome per la detruo de la reĝimoj ekzistantaj en Rusio, Aŭstrio, Prusio kaj Turkio, kaj per reorganizo de la popola vivo de malsupre supren en plena libereco.
M. - Tio signifas, ke ci ankoraŭ ne forlasis cian antikvan pan-slavismon. Ci estas la sama malnova patrioto rusa, kiel ci estis en Parizo.
B. - Kion ci subkomprenas per "rusa patrioto" ? Estu sincera, Marks ! Ĉu ci ankoraŭ kredas, ke mi estas speco de agento de la rusa registaro ?
M. - Mi neniam tion kredis, kaj ĝuste unu el la motivoj, pro kiuj mi hodiaŭ akceptis cian inviton, estas forviŝi la plej foran rememoron pri tiu bedaŭrinda suspekto.
B. - Tamen la kalumnio estis unuafoje publikigita en la "Neue Rheinische Zeitung", kiam ci estis ties direktoro.
M. - Mi jam klarigis al ci la cirkonstancojn. La novaĵo alvenis de nia pariza korespondanto, kiu eksciis de George Sand, ke ci estas rusa spiono. Poste ni publikigis la reĝustigon de George Sand kaj la cian entute. Ni ne povis fari pli. Mi mem persone petis senkulpigon.
B. - Tamen vi ne sukcesis disneniigi tiun onidiron, eĉ kiam mi estis translokita de aŭstria prizono en alian en Rusio ; nek pli poste, kiam mi estis deportita en Siberion. Ci neniam estis enkarcerigita, Marks ; ci ne scias, kio estas sin senti vivante enterigita, kaj devi konfesi al si mem ĉiuhore tage kaj nokte : "Mi estas sklavo, senestonta homo." Sin senti plene de-

diĉita al la libereca afero, preta sinoferi por ĝi, kaj vidi sian entuziasmon neniigita per kvar muroj. Ĉio ĉi estas sufiĉe malmilda, sed la plej terure estas, tuj liberigota, sin vidi akuzita, senhonorige kalumniita pri tio : esti agento de l'tirano, kiu metis vin en prizonon.

M. - Trankviliĝu, neniu plu pensas nun pri tiu afero.

B. - Mia kara Marks, tiu mensogo rekomencas cirkuli ĉi tie mem, en Londono. Ĝi estis publikigita en unu el tiuj figazetoj, kiujn cirkuligas Denis Urquhart, iu Anglo el viaj amikoj, mi bedaŭras ĝin diri al ci.

M. - Urquhart estas fiksideulo, li adoras ĉion, kio estas turka, kaj malamas ĉion, kio estas rusa, sisteme. Lia kapo ne estas sur ĝusta loko.

B. - Sed ci skribas en liaj publikaĵoj kaj parolas ĉe lia tribuno, mia kara Marks.

M. - Povas ŝajni ekstravagance, ke ni apenaŭ samopinias pri Palmerston - li almenaŭ tion kredas - kaj li proponas al mi publikigi miajn laborojn. Temas pri propagando, kaj li pagas samkiel "New York Tribune". Sed estu certa, Bakunin, ke tiu idiota akuzo naŭzis min pli ol cin. Mi asertas al ci, ke mi neniam partoprenis en ĝia diskonigo. Mi estas la unua por ĝin bedaŭri.

B. - Mi sincere akceptas ciajn ekskuzojn, Marks.

M. - Tamen estas io, kiun mi signalu al ci. Cian pan-slavismon mi konsideras kontraŭa al la interesoj de l'socialismo ; ĝi povas konduki nur al minaca kresko de la rusa potenco en Eŭropo.

B. - La pan-slavismo - t.e. la demokrata panslavismo - estas parto de la granda liberiga movado eŭropa.

M. - Absurde, absurde !

B. - Pruvu al mi la malon, kara Marks. Prav-

igu cian aserton.
M. - Pan-slavismo apogeis en la oka kaj naŭa jarcentoj, kiam la sklavoj de l'Sudo ankoraŭ okupis Hungarion, Aŭstrion kaj minacis Bizancon. Se ili ne povis tiam sin defendi kaj konservi sian sendependecon, kiam iliaj du malamikoj, la Germanoj kaj Madjaroj estis strangolantaj unuj la aliajn, kiel ili povus tion fari nun post mil jaroj da subpremado kaj malnaciigo? Preskaŭ ĉiuj landoj en Eŭropo havas disigitajn minoritatojn, pasintecajn postrestaĵojn, kiuj impulsas la disvolviĝon de l'historio. Ĉu ci scias, ke Hegel nomis tiujn minoritatojn "etna foliaro" ?
B. - Alivorte, tiujn popolojn ci konsideras neatentindaj, malindaj je vivorajto.
M. - Ne komprenas mi la lingvon de l'rajtoj. La ekzisto de tiuj popoloj estas protesto kontraŭ la historio, kaj tial ili ĉiam estas reakciaj. Jen pruvo : la gardistaĉoj sur la punŝipoj de Skotlando ; la defendantoj de la Stuartoj de 1640 ĝis 1745 ; la Bretonoj de la Ŝuananaro partizanoj de l'Burbonoj de 1792 ĝis 1800. Aŭ la Vaskoj en Hispanio, aŭ Aŭstrio en 1848. Kiu do tiam faris la revolucion ? La Germanoj kaj Madjaroj. Kaj kiu liveris armilojn kaj ebligis al la reakciaj Aŭstroj venkobati la revolucion ? La Slavoj. La Slavoj atakis la Italojn, uragane eniris en Vienon kaj restaŭris la monarkion de la Habsburgoj. La Slavoj plu tenis la Habsburgojn ĉe la regpovo.
B. - Jes, sed ili estis Slavoj de la imperiestra armeo. Ci tre bone scias, ke la panslava movado estas demokrata kaj nepre kontraŭstaras la Habsburgojn, Romanofojn aŭ Hohencolernojn.
M. - Jes, mi legis viajn manifestojn. Mi scias, kion vi VOLUS atingi.
B. - Nu, ci estas bone informita pri mia propono : abolicio de ĉiuj artefaritaj landlimoj en Eŭropo kaj starigo de limoj strekitaj laŭ la suverena volo de la popoloj mem.
M. - Tio tre bele sonas. Ci nur simple ignoras

la verajn obstaklojn, kiuj stariĝas antaŭ ĉiu el tiuj planoj : la civilizajn nivelojn, tre diferencajn, atingitajn de la diversaj eŭropaj popoloj.

B. - Mi ĉiam kalkulis kun la malfaciloj, Marks. Mi asertis, ke la sola maniero ilin supervenki estas praktikado de federativa politiko. La Slavo ne estas malamiko de la demokratoj Germanoj kaj Madjaroj. Li proponas al li fratan aliancon bazitan sur la libereco, egaleco, frateco.

M. - Ĉio ĉi estas nur senbazaj paroloj, ili ne havas sencon fronte al la faktoj, kaj la faktoj estas tiel simplaj kiel brutalaj. Escepte de via raso kaj de la Poloj, eble de la Turkiaj Slavoj, la aliaj Slavoj ne havas estontecon, ĉar mankas al ili nemalhaveblaj kvalitoj por la sendependeco historia, geografia, ekonomia, politika kaj industria. Unuvorte, mankas al ili civiliziteco.

B. - Ĉar civilizitecon la Germanoj posedas, ĉu ? Ĉu ci kredas, ke ilia granda civilizacio rajtigas la Germanojn superregi Eŭropon kaj krimi kontraŭ la aliaj popoloj ?

M. - Kiuj krimoj ? Mi vane konsultas la historion, mi trovas, ke la nura delikto farita de la Germanoj kaj Madjaroj kontraŭ la Slavoj estis ilin malhelpi konvertiĝi en Turkojn.

B. - Bone, mia kara Marks ; mi ĉiam diris pri Germanio, kion diris Voltaire pri Dio ; se ĝi ne ekzistus, endus ĝin inventi. Estas nenio pli efika por pluteni viva la pan-slavismon ol malamo kontraŭ Germanio.

M. - Jen alia pruvo, ke cia bedaŭrinda panslavismo estas reakcia. Ĝi instruas malamon kontraŭ Germanio prefere ol malamon kontraŭ sia vera malamiko : la burĝaro.

B. - Ambaŭ kunpariĝas : jen kiel mi progresis de post la naciismo de mia junaĝo. Hodiaŭ mi asertas, ke libereco estas mensogo tiom longe, dum la plej multo el la popoloj estas senigita je libereco, litertempo kaj pano.

M. - Kiel ci ĝin scias, Bakunin, mi cin konsideras kiel amikon kaj mi ne hezitas cin nomi socialisto, kvankam...
B. - Kvankam... kio ?
M. - Nu, ci konstante senvalorigas tion, kion mi nomas politiko.
B. - Certe, la parlamento, partioj, konstituantaj asembleoj kaj reprezentaj institucioj ne interesas min. La homaro bezonas ion pli altan: novan mondon senleĝan kaj senŝtatan.
M. - Anarkion.
B. - Jes, anarkion. Ni devas renversi la politikan ensemblon kaj la moralan ordon de la nuna mondo. Ni devas ĝin ŝanĝi de supre malsupren: estas ĥimero kredi, ke oni povas modifi la ekzistantajn instituciojn.
M. - Mi ne volas ilin modifi : mi simple diras, ke la laboristaro devas ilin kapti.
B. - Ili devus esti komplete aboliciitaj. La Ŝtato koruptas same bone niajn instinktojn kaj volon, kiel nian inteligenton. La fundamenta principo de ĉia valida socialismo estas renversi la socion.
M. - Tion mi nomas kurioza difino pri socialismo.
B. - La difinoj por mi ne gravas, Marks ; en tio ni plene diferencas. Mi ne opinias, ke ajna antaŭfabrikita sistemo povas savi la mondon. Mi same kredas je la instinkto kiel je la penso.
M. - Sed ci neniam estos socialisto, se ci ne havas politikon.
B. - Nu, mi havas unu. Se havi politikon signifas antaŭaranĝi la aferojn punkton post punkto, mi cin diros, kiu estas mia programo : unue, abolicii la leĝojn fabrikitajn de la homoj.
M. - Ci ne povas forigi la leĝojn. La tuta universo estas regata de leĝoj.
B. - Komprenebla, ni ne povas forigi la leĝojn naturajn, pri tio mi akordiĝas kun ci. La homoj povas pliigi sian liberon, plivastigante sian konon pri la naturaj leĝoj, kiuj regas la universon. La homo ne povas ignori la naturon, kaj tia propono estus absurda. Ne tion mi proponas :

mi diras, ke ni devus forigi la leĝojn faritajn de la homa mano, la artefaritajn leĝojn. Alivorte, la politikajn kaj jurajn leĝojn.
M. - Ci ne povas serioze pretendi, ke la socio ne devas trudi leĝojn al siaj propraj membroj.
B. - La socio ne bezonas trudi leĝojn. La homo estas, laŭnature, sociema estaĵo. Ekster la socio li povas esti besto aŭ sanktulo. Estas leĝoj en la kapitalista socio, ĉar tiu ĉi estas konkurlibera kaj fronte kontraŭigas la homon kontraŭ la homo. La libereco estos ebla nur kiam ĉiuj homoj estos egalaj ; tial, ne povas esti libereco sen socialismo.
M. - En tio, mi plene akordiĝas kun ci.
B. - Ci diras esti en akordo kun mi, Marks, sed kiam mi asertas, ke ne povas esti libereco sen socialismo, mi ankaŭ subdiras kaj substrekas, ke socialismo sen libereco estas sklaveco kaj brutaleco.
M. - Mi neniam defendis socialismon sen libereco.
B. - Jes ja. Ci defendas la proletaran diktaturon.
M. - La proletara diktaturo estas samtempe parto de la libereco kaj parto de la liberiga procezo.
B. - Kiam mi parolas pri libereco, mi pensas pri la sola libereco inda je tiu nomo : la libereco, kiu konsistas en la plena disvolviĝo de ĉiuj fortoj materialaj, ekonomiaj kaj moralaj ekzistantaj en la homo ; libereco, kiu povas allasi nenian limigon, escepte de tiu fiksita de la leĝoj de nia naturo mem. Mi defendas liberecon, kiu tute ne estas premita de alies libereco, sed male konfirmita kaj ampleksigita de ĉies libereco. Mi volas liberecon triumfantan super la bruta forto kaj aŭtoritata principo.
M. - Mi ja komprenas ciajn vortojn, sed mi nescias la signifon, kiun ci atribuas al ili.
Mi tuj klare diras al ci, ke neniam ci sukcesos akceli la alvenon de socialismo, aŭ realigi

ion substancan en politiko sen deiri de la aŭtoritata principo.
B. - Socialismo bezonas principon disciplinan kaj ne aŭtoritatan. Ne specon de disciplino trudata de ekstere, sed disciplinon memvolan kaj pripensitan, kiun la homo trudas al si mem, kaj kiu perfekte harmoniiĝas kun la libereca principo.
M. - Laŭŝajne ci profitis nemulton de cia ribela spertado, Bakunin. Tiuj movadoj ne povis firmiĝi sen la aŭtoritata principo. Necesas kapitanoj eĉ por la anarkiistaj armeoj.
B. - Evidente, en la momento de la milita agado, en plena batalo, la roloj estas dispartigitaj laŭ ĉies kapabloj ; kelkaj homoj estras kaj komandas, aliaj plenumas. Sed neniu funkcio restu fiksa kaj ŝtonigita. Ne ekzistas hierarkia ordo: la hodiaŭa estro morgaŭ transformiĝu al subulo. Neniu sin levas super la aliajn, kaj se tion li faru kelkatempe, li poste malleviĝu kiel la maraj ondoj ĉe la bonfaran nivelon de egaleco.
M. - Nu ! Bakunin, se ci konsentas, ke estrado kaj komando estas necesaj dum la batalo, ni eble povos akordiĝi pri la cetero. Mi ĉiam asertis, ke la proletara diktaturo estos necesa nur dum la unuaj tempoj de l'socialismo. Tuj kiam la senklasa socio estos maturiĝinta, la ŝtato povos malaperi. Se uzi esprimon de mia kunlaboranto Engels : "la ŝtato vakuiĝos".
B. - Mi ne vidas signon de vakuiĝo de la ŝtato en la "Komunista Manifesto", kiun ci kaj Engels verkis. Ĝi estas inĝenia pamfleto, kiun mi ne tradukus, se mi ne tia ĝin taksus. Tamen, el la dek punktoj de la socialista programo de vi priskribita en tiuj paĝoj, almenaŭ naŭ advokatas la plifortigon de la ŝtato : la ŝtato posedu ĉiujn produktrimedojn, kontrolu la komercon kaj krediton, trudu la devigatan laboron kaj kolektu la impostojn, estru la transportojn kaj komunikilojn kaj regu la lernejojn kaj universitatojn.
M. - Se ci ne akceptas tiun programon, ci ne volas socialismon.

B. - Sed tio ne estas socialismo, Marks ! Ĝi estas la plej pura formo de ŝtatismo, la elefanteska ŝtato de la Germanoj, neapartigebla de la gilotino. Socialismo signifas kontroladon super la industrio kaj agrikulturo fare de la laboristoj mem.

M. - Socialista ŝtato estas ŝtato proletara. Ambaŭ rekte kontrolu la tuton.

B. - Jen la tipa iluzio burĝeca, la demokratia iluzio, kiu pretendas, ke la popolo povas kontroli la ŝtaton. Praktike, estas la ŝtato, kiu kontrolas la popolon, kaj ju pli la ŝtato estas forta, des pli ĝia superinfluo estas etendita. Rigardu tion, kio okazas en Germanio : laŭmezure kiel la ŝtato plifortiĝas, la tuta korupto, kiu akompanas la centralizan politikon, etendiĝas al la publiko, kiu tamen estas konsiderata kiel la plej honesta en la mondo. Endas aldoni, ke la kapitalista monopolo progresas laŭ la sama rapido kiel prosperas la ŝtato.

M. - La kresko de la kapitalista monopolo preparas la vojon por akiri la socialismon. La kaŭzo pro kio Rusio staras tiel malproksime de socialismo kuŝas en la fakto, ke ĝi apenaŭ eliras el feŭdismo.

B. - La rusa popolo estas pli proksime de socialismo ol ci kredas, mia kara Marks. En Rusio la laboristoj havas apartan revolucian tradicion, kaj por la liberigo de la homa genro granda tasko estas al ĝi rezervita. La rusa revolucio havas profundajn radikojn en la popola animo : en la XVIIa jarcento, la vilaĝanoj ribelis en Sud-Oriento kaj en la XVIIIa Pugaĉev kondukis kamparanan ribelon en Volgovalo, ribelon kiu daŭris du jarojn. La Rusoj ne forpuŝas la perforton, ili scias, ke la frukto de l'homa progreso estas makulita per sango. Ili ankaŭ ne hezitas antaŭ la fajro : la incendio de Moskvo, kiu estis la deirpunkto de la Grand-Armea returniro, estas fakto originale rusa. Ili estas la brulŝtiparoj sur kiuj

la homa raso liberiĝos el la sklavecaj skorioj.
M. - Amiko mia, kion ci ĵus diris, tio dramece sonas, sed la konkreta demando estas jena : socialismo dependas de klaskonscia formado en la proletaro, kaj tion ni povas esperi nur en la alte industriigitaj landoj, kiel Anglio, Germanio, Francio. La kamparanaro estas malpli organizita kaj el ĉiuj sociaj klasoj la malplej taŭga por la revolucio. La kamparanoj estas pli regresemaj ol la "lumpenproletariat" (la senhavuloj kaj feĉo de la urboj), ili estas puraj barbaroj, troglodito j.
B. - Jen kie kuŝas nia profunda malakordo,Marks. Por mi la kremo de l'proletaro ne estas, kiel ci kredas, la uzinlaboristoj, kiaj ajn estas iliaj kapablecoj ; ili preskaŭ ĉiam estas duonburĝaj aŭ aspirantaj esti tiaj. Mi konis tiom da ili en la laborista movado Svisia, mi povas aserti al ci, ke ĉiuj estas penetritaj de ĉiuj sociaj antaŭjuĝoj, de ĉiuj malgrandanimaj aspiroj de la mezklaso. La teknikistoj estas la malplej socialistaj el ĉiuj laboristoj. Antaŭ miaj okuloj, Marks, la elito de l'proletaro estas la grandamaso, la plebo, la milionoj da malfeliĉuloj kaj analfabetuloj de ci ridindigitaj, kiujn ci malŝate nomas "lumpenproletariat".
M. - Evidente, ci ne multe profundigis la koncepton pri proletaro. La proletaro ne estas la malriĉuloj, ĉiam estis malriĉuloj. La proletaro estas io nova en la historio. Ne malriĉeco nek malbonsorto igas la homojn proletoj, sed ilia kolero kontraŭ la burĝaro, ilia digno, ilia kuraĝo kaj rezoluteco meti finon al sia kondiĉo. La proletaro formiĝas nur, kiam la indigno, la klaskonscio aldoniĝas al la malriĉeco. La proletaro estas la klaso kun revolucia fincelo, la klaso kiu aspiras al detruo de ĉiuj klasoj, la klaso kiu ne povas emancipiĝi sen emancipi la tutan homaron.
B. - Via socialismo ne eliminas la klasojn, Marks, sed kreas du klasojn : tiun de la regantoj kaj tiun de la regatoj ! Ĝi postulos regist-

aron kun multe pli da plenumendaj funkcioj ol tiuj ĝis nun ĝenerale atribuitaj al registaro, kaj estos regata la popolo. Unuflanke, la ekstrema maldekstrularo de la "intelligentsia", la plej despota, la plej aroganta klaso imagebla, volos komandi nome de la sperto ; aliflanke, la simpla kaj nescianta popolamaso devos obei.

M. - La leĝodonantoj kaj administrantoj de la socialista ŝtato estos la reprezentantoj de l' popolo.

B. - Ankoraŭ alia liberala iluzio, ke registaro naskiĝinta de balota konsulto povus reprezenti la popolvolon. Eĉ Rousseau neis ĉian kredeblecon pri tiu aserto. La instinktaj intencoj de la registaraj elitoj ĉiam estas kontraŭaj al la instinktaj celoj de la strathomo. Juĝante la socion de sia alta pozicio, malofte okazas ke la registaroj sukcesas eviti aŭtoritatajn kaj superregajn agojn.

M. - La demokratio bankrotis pro akaparo fare de la burĝara financpovo super la politikaj institucioj.

B. - La pseŭdo-demokratio socialista estus falsita per aliaj premoj. Parlamento konsistanta ekskluzive el laboristoj - la samaj laboristoj kaj la samaj socialistaj direktantoj kiel hodiaŭ - transformiĝus de vespero al mateno al aristokrata parlamento, ĉiam tiel estis. Sendu la ekstremistojn sidi en la ŝtataj foteloj, kaj ili konvertiĝos en konservativulojn.

M. - Estas kaŭzoj por tio.

B. - La ĉefa kaŭzo estas, ke demokrata ŝtato estas kontraŭsenco. Pro sia esenco la ŝtato estas aŭtoritato, forto, superrego kaj konsekvence senegaleco. La demokratio laŭdifine estas egaleco ; do demokratio kaj ŝtato ne povas kunekzisti. Prudhon neniam estis tiel klarvida, kiel kiam li asertis, ke la universala voĉdonrajto estas kontraŭrevolucia.

M. - Jen evoluo vere indika pri la ĵurnalista

mensostato de Prudhon. Vere estas, ke la tro ofte mizerantaj laboristoj estas facile influataj de la burĝara propagando por esti kapablaj bonuzi sian voĉdonilon, sed la universala voĉdonrajto povas esti utiligata por socialistaj celoj. Ni povas eniri en la politikon kaj fari ion rigardatan demokratia. Per nia eniro en la parlamenton ni povas realigi ne ĉiujn niajn celojn, sed almenaŭ parton de ili.

B. - Neniu ŝtato, eĉ ne respubliko la plej ruĝbrile kolorita, povos doni al la popolo, kion ĝi plej bezonas : liberecon. Ĉiuj ŝtatoj inkluzive de via socialista ŝtato, kara Marks, estas bazitaj sur la forto.

M. - Kiun alian rimedon oni povus uzi ?

B. - Edukadon, konon.

M. - Instruado mankas al la popolo.

B. - Ĝi povas esti edukita.

M. - Kaj kiu do povos ĝin eduki, se ne la ŝtato?

B. - La socio povas sin eduki mem. Bedaŭrinde ĉiuj registaroj en la mondo lasis la popolon en tia stato de nescio, ke necesus malfermi lernejojn ne nur por la infanoj, sed ankaŭ por la plenkreskuloj. Tiuj lernejoj devus esti senbalastigitaj de ĉia spuro de aŭtoritata principo. Kaj ne lernejoj en la konvencia senco de l'vorto, sed popolaj akademioj, en kiuj la spertoriĉaj lernantoj iafoje kapablus instrui siajn proprajn instruistojn. Tiele, speco de intelekta frateco disvolviĝus inter ili.

M. - Bone, finfine ci akceptas du kategoriojn de instruistoj. Mi ne kredas, ke la instruado konsistigos gravan problemon post la starigo de socialista socio.

B. - Jes, la unua problemo estas la ekonomia emancipado. La cetero venos senklopode.

M. - Nenio senklopode venos, kaj ja la socialista ŝtato devos determini la sekvon. La tuta historia sperto tion demonstras : la homoj hodiaŭ la plej evoluintaj en Eŭropo - la Francoj kaj Germanoj - ŝuldas sian edukitecon al firma ŝtata sistemo, kiu gvidas la publikan instruadon. En

la landoj, kie la ŝtato ne zorgas pri la lerneja edukado, la popolo estas senrimede analfabeta.
B. - En Anglio la grandaj kolegioj kaj universitatoj eskapas al la ŝtata kontrolo.
M. - Sed, kio estas pli malbona, ili kuŝas en la mano de la anglikana Eklezio, kiu cetere estas fako de la ŝtato.
B. - La kolegioj de Oksfordo kaj Kembriĝo estas regataj de sendependaj kaj tradiciaj societoj.
M. - Ci ne multe konas la anglan vivon, Bakunin. La du kolegioj estis radikale reformitaj per leĝoj fontantaj el la Parlamento. La ŝtato devis interveni por ilin savi de ilia kompleta intelekta dekadenco, sed malgraŭ tio ili ankoraŭ malfruas kompare al la germanaj universitatoj.
B. - Tamen ilia ekzisto demonstras, ke estas eble por la lernantoj kontroli siajn proprajn kolegiojn. Kaj ne estas kialo por supozi, ke la laboristoj ne scias administri samprocede siajn bienojn aŭ uzinojn.
M. - Certe venos tago, kiam tiel estos, sed atendante, laborista ŝtato devos okupi la lokon de la burĝaj proprietuloj.
B. - Ĝuste ĉi tie ni disiĝas, Marks. Ci kredas, ke endas organizi la laboristojn por konkeri la ŝtaton, dum mi male volas ilin organizi por ĝin detrui, aŭ se ci preferas, por ĝin likvidi. Ci volas utiligi la politikajn instituciojn, kaj volus mi, ke la popolo libere kaj spontanee federiĝu.
M. - Kion ci subkomprenas per spontanee federiĝi ?
B. - La laboro sin organizos mem. Produktasocioj bazitaj sur reciproka helpo konstituiĝos laŭdistrikte, kaj la distriktoj libere asociiĝos kun pli etenditaj unuoj ; la tuta povo venos de la bazo.
M. - Tiaj projektoj estas komplete ĥimeraj. Ili estas kopio de la falansteroj kaj dudeka

eldono de la "Nova Jerusalemo" proponita de la utopiistaj socialistoj. Ili estas miskonsistaj projektoj, sed bedaŭrinde danĝeraj, ĉar ili enŝovas en la socialismon nocion bastardan, nerajtan, kiu povas okupi la lokon de la vera solvo. Deturnante en la tuja momento la atenton de l'homoj, ili efikas konservative kaj reakcie.

B. - Ci vere ne povas riproĉi al mi, Marks, deturni la atenton de l'homoj de la tuja batalo. Krome, mi opinias kiel ci, ke ekzistas nur du partioj en la mondo : la partio de la revolucio kaj tiu de la reakcio. La pacistaj socialistoj kun siaj kooperativaj societoj kaj modelaj popoloj apartenas al la reakcia partio. La revolucia partio bedaŭrinde jam estas dividita en du frakcioj : la ĉampionoj de la socialista ŝtato kiujn ci reprezentas, kaj la liberecanaj socialistoj, al kiuj mi apartenas. Cia frakcio havas multajn partizanojn, kompreneble en Germanio kaj eĉ ĉi tie en Anglio. Sed en Italio kaj Hispanio ĉiuj socialistoj estas liberecanaj. La problemo, kiu fakte stariĝas, estas jena : kiu tendenco superiĝos en la laborista movado internacia ?

M. - La tendenco vere socialista, mi kredas, kaj ne la anarkiista.

B. - Vi nomas vera, pura, vian socialismon, ĉar vi eraras pri la vera naturo de la popola diktaturo. Vi ne konscias pri la ebla danĝero starigi novan sklavecon sekvante la ekzemplon de aliaj ŝtatoj.

M. - Ci supozas ke, ĉar la ŝtato ĉiam estis la instrumento de la reganta klaso, tiel estos eterne. Ĉu ne estas imagebla ekzisto de malsama ŝtatklaso ?

B. - Oni povas imagi ŝtaton tiel malsaman, ke ĝi tute ne plu respondus al tiu nomo. Ekzemple, oni povas pensi pri la sistemo proponita de Prudhon : simpla aferoficejo, centra likvidbanko en la servo de la socio.

M. - Probable tiele definitive formiĝos social-

ista socio. Venos tago, kiam la popolregado cedos la lokon al la aferadministrado, sed antaŭ ol malaperos la Ŝtato, ĝi devos esti plifortigita.
B. - Tio estas ne nur paradoksa, sed ankaŭ kontraŭeca.
M. - Kion vi volas fari ; tiel estas ! Ci konas Hegel-on samkiel mi, kaj ci scias, ke la historia logiko estas logiko de la kontraŭdiroj. Kion oni asertas, tion oni povas nei.
B. - La argumento valoras kiel Hegela, sed neniom valoras se paroli historie. Ci neniam sukcesos detrui la Ŝtaton, ĝin plifortigante. Mi estas cia disĉiplo, Marks ; ju pli pasas la tempo, des pli mi certiĝas, ke ci pravas ekmarŝante tra la granda vojo de la ekonomia revolucio, vokante nin ĉiujn sekvi ciajn paŝojn. Neniam, tamen, mi sukcesis kompreni kaj akcepti ciajn aŭtoritatajn projektojn.
M. - Se ci estas anarkiisto, ci ne povas esti mia disĉiplo; sed eble estus preferinde detale ekzameni cian eraron. Unue, ci rigardas la aŭtoritatan principon, kvazaŭ ĝi estus ĉie kaj ĉiel erara. Tio estas supraĵa vidpunkto. Ni travivas industrian eraon ; la modernaj uzinoj, en kiuj centoj da laboristoj gvidas komplikajn maŝinojn, forpuŝis for de la konkurado la modestajn metiistajn laboratoriojn. Eĉ la agrokulturo post nelonge estos superregata de la maŝino. La kombinita kunagado forpuŝas la individuan sendependan agadon ; kombinita agado signifas organizadon, kaj organizado implicas aŭtoritaton. En la mezepoka mondo, la etmetiisto povis esti sia propra mastro, sed en la moderna mondo estreco kaj subeco estas necesaj. Se ci proponas rezisti al ĉia aŭtoritato, ci kondamnas cin mem vivi en la pasinteco.
B. - Mi ne volas rezisti al ĉia ajn aŭtoritato, Marks. Koncerne ŝuojn, ekzemple, mi konformiĝas al la aŭtoritato de la ŝuisto ; se temas pri konstruado, al tiu de la arkitekto ; pri

la sano mi fidas la aŭtoritaton de la kuracisto. Tamen, mi ne povas permesi, ke la ŝuisto, arkitekto aŭ kuracisto apliku sian aŭtoritaton super mi. Mi amike akceptas iliajn konsilojn ; mi respektas iliajn sperton kaj konojn, sed mi rezervas al mi la rajton pri kritiko kaj cenzuro. Mi ne kontentiĝas per konsulto de unu sola aŭtoritato ; mi konsultas plurajn kaj komparas iliajn vidpunktojn ; mi konsideras neniun neerarema. Mi konfesas, ke mi ne povas ĉion scii, neniu povas ĉion scii, la homo ĉioscia kaj universala ne ekzistas. Mia racio malhelpas min akcepti fiksan aŭtoritaton konstantan kaj universalan.

M. - Sed se ci forigas la aŭtoritaton de la ekonomia kaj politika vivo, nenio povos iel ajn realiĝi. Ekzemple, kiel povus funkcii la trajnoj, se ne estus iu kun povoj por establi la liniojn, se estus neniu por decidi je kioma horo la trajnoj foriru, neniu por kombini la horarojn kaj eviti la akcidentojn ?

B. - La fervojistoj tre bone povas mem elekti la agentojn por ĉiuj ĉi funkcioj kaj eĉ libere obei la necesajn instrukciojn. Laŭ ciaspeca socialismo, Marks, mi facile imagas ŝoforojn de arkaikaj lokomotivoj, kiuj ekfunkciigus maŝinojn por nova klaso de privilegiitaj vojaĝantoj : la administrantoj de la socialista ŝtato kun impona cigaro interlipa en la unuaklasaj vagonoj.

M. - Aŭskultu, Bakunin, mi ne estas pli ol ci amanto de la ŝtato. Ĉiu vera socialisto akceptas malaperon de la ŝtato tuj, kiam la socialisma triumfo igos ĝin senutila. Sed ci volas, ke la politika ŝtato abrupte malaperu, lasante la laboristojn sen ia speco de gvidado, disciplino aŭ kontrolo. La nodo de la demando kuŝas en tio, ke vi, anarkiistoj, nehavas planojn por la estonto.

B. - Ĝuste tial, ke ni ne povas ekzakte antaŭvidi tion, kio estos la estonto, mi malfidas la detalajn planojn. Kiam la egoistaj instinktoj lasos lokon al la frateco, mi kredas ke la tek-

nikaj problemoj pri produktado kaj distribuado estos solvitaj interkonsente kaj kun la popola bonvolo.

M. - Ciaj duboj, Bakunin, estas parte psikologiaj, parte moralaj. Ili estas ankaŭ intelektaj. Ci eraras, kiam ci kredas ke la Ŝtato kreis la kapitalon. Tio akcentas la trosimpligecon de cia starpunkto. Ci kredas, ke sufiĉas forpuŝi la ŝtatan obstaklon, por ke la kapitalismo aŭtomate malaperu. La vero estas tute alia : ni forigu la kapitalon, ni forigu la koncentradon de la produktrimedoj en la manoj de kelkaj privilegiuloj, kaj la Ŝtato baldaŭ ne plu estos malutila.

B. - La malbono kuŝas en la vera naturo de la Ŝtato ; ĉiuj ŝtatoj estas la negacio de la libereco.

M. - Alprenante tian ekstreman pozicion rilate la ŝtaton, ci ege kompromitas la laboristan aferon ; ci uzas cian influon, Bakunin, por konsili al la laboristoj sindetenon en la balotoj.

B. - Mi faras pli ol konsili al ili sindetenon. Mi kuraĝigas ilin por la lukto.

M. - Ci puŝas ilin al la batalo kun necerteco pri venko, kaj tio estas alia tipo de respondeco. Mi aludis ciajn moralajn erarojn ; unu el ĉi tiuj estas cia manko de kvieteco. Ci plezuriĝas en la barikada gerilo eĉ por aferoj pri kiuj ci ne kredas, kaj tio por kontentigi cian profunde radikantan inklinon al perforta aktiveco, pro pura ekscitiĝo. Ci preteratentas la veran politikan aktivecon, ĉar ĝi postulas paciencon, ordemon kaj pripenson.

B. - Mi dediĉas mian tutan vivon al la politika aktiveco.

M. - Ci dediĉas cian vivon al la politika konspiro, kio ne estas la samo.

B. - Mi pasigas mian tutan vivon inter la laboristoj : organizado, propagando, edukado.

M. - Edukado ? Por kio ?

B. - Por la revolucio. Mi ne povas akcepti, ke

la laboristoj disperdu sian energion en la trompaj reprezentaj institucioj de tipo registara.
M. - Mi komprenas, ke tiaj ideoj povos trovi adeptojn en Italio kaj Hispanio, inter advokatoj, studentoj kaj aliaj intelektuloj, sed la laboristoj ne volos resti fremdaj al la politikaj problemoj en siaj landoj. Diri al la laboristoj sin deteni politikumi, tio estas ilin puŝi en la brakojn de l'pastroj kaj respublikaj burĝoj.
B. - Mia kara Marks, se ci legis, kion mi skribis, ci scias ke mi konstante kaj vigle kontraŭbatalis la Eklezion kaj la respublikanojn. Ciaj opinioj, kompare kun la miaj, estas multe pli moderaj.
M. - Mia kara amiko, mi neniam dubis pri cia sincera abomeno kontraŭ la pastroj kaj respublikanoj, sed ci ne komprenas, ke malgraŭ cia propra volo, ci favoras ilian aferon.
B. - Ci ŝercas, kara Marks.
M. - Ne, mi parolas serioze. Ni ekzamenu cian porliberecan propagandon. Klare estas, ke la nura libereco pri kiu ci kredas, estas la individua libereco, ci konsideras, ke neniu devas esti regata de iu ajn. Ci konsideras aparte ĉiun homon posedanta proprajn rajtojn minacatajn de la sociaj kaj kolektivaj institucioj, kia la Ŝtato. Ci neniam sukcesas pensi, kiel pensas ĉia vera socialisto, pri la tuto de la homaro aŭ pri la homo kiel estaĵo neapartigebla de la socio.
B. - Unu fojon plian, Marks, ci pruvas, ke ci ne aŭskultis min kaj ne komprenis, kion mi volis diri.
M. - Mi pretendas, ke mi cin komprenis pli bone, ol ci mem. Rifuzante koncepti la Ŝtaton alie ol kiel preman instrumenton, ci demonstras cian nekapablecon koncepti la homon alie ol kiel izolitan unuon, ĉiun kun sia volo, siaj propraj interesoj kaj siaj deziroj. Tion kredas la teoriistoj de la liberala burĝa penso, kaj vi, anarkiistoj, havas la saman koncepton pri la homa estaĵo en la socio. Via anarkiismo estas pura liberalismo ĝisekstreme puŝita, histerie ĝisekstreme puŝita. Via filozofio estas esence egoisma, vi havas koncepton

pri la memo kaj pri la mema libereco parencan al la kapitalisma metafiziko.

B. - La metafiziko ne interesas min.

M. - Tamen, de kiu ajn flanko ci ĝin rigardas, anarkiismo trafas metafizikajn konkludojn. Vi havas etikon tre similan al la kristana moralo. "Reciproka-n apogo-n", vi ripetas, kio en konvenciaj kristanaj terminoj povus esti tradukita per : "Amu cian proksimulon, cin oferu por aliuloj". La vera socialismo ne bezonas maksimojn, ĉar ĝi ne agnoskas la individuan izoliteccon. En socialista socio la homo ne povas esti apartigita de sia najbaro aŭ de si mem.

B. - Ĉar la ŝtato estas la kaŭzo de tiu apartigo, evidentas, ke ne estas alia solvo, ol elimini la ŝtaton.

M. - Sed oni ne povos ĝin elimini tiom longe, dum oni ne estos ŝanĝinta la kondiĉojn, kiuj faras el la ŝtato necesan elkreskaĵon de la socio.

B. - Tuj kiam la laboristaro havos sufiĉe da forto por ĝin forpuŝi, la ŝtato ĉesos esti necesa.

M. - Ci do konfesas, ke ĝi nuntempe estas necesaĵo ?

B. - Ĝi estas necesa por socio bazita sur la privata proprieto. Kiam la privata proprieto estos distribuita dank'al triumfo de l'socialismo...

M. - Socialismo prizorganta la redistribuadon de la proprieto estas vera modelo pri vulgareco. Nu, Bakunin ! ci ne estas el tiuj, kiuj opinias, ke socialismo konsistas en libera dispartigo individua.

B. - Tio sendube estas unu el ĝiaj celoj.

M. - Mia amiko, la finceloj de socialismo estas multe pli radikalaj. Ĝi proponas al si plenumi kompletan transformon de la homa naturo, transformon de la memo, kreon de la nova homo, kun individua volo fandiĝinta en la socio, ĉiu liberiĝinta el sia propra izoliteco. Ci diras, ke cia celo estas la libereco : la socialismo donos al ni liberecon por tiel diri nekonitan

en la pasintaj eksperimentoj de la homaro.
B. - Ci faras el la vivo ion tro misteran.
M. - Kaj ci ĝin reduktas al io tro malgranda. Kontemplu la mondon, Bakunin, kaj imagu, ke certa parto estas libera, kaj la alia subpremata.
B. - Mi nenion imagas : tio estas la realo. La malplimulto estas libera : la riĉuloj.
M. - Mi diru al ci, ke neniu estas libera en la nuntempa mondo, eĉ ne la plej riĉaj burĝoj. Laŭ morala vidpunkto, la kapitalisto, kiel homo, estas same sklavo de la sistemo, kiel estas la laboristo. Kaj tio permesas al ni aserti, honore al la vero, ke la proletara emancipado reprezentas la emancipadon homaran.
B. - Sed la substanco restas : la riĉulo povas ĉion fari laŭplaĉe, dum al la malriĉulo mankas la neceso.
M. - Tamen, la elekto de la riĉulo estas gvidata kaj malpliigita pro ties kulturo, burĝaj antaŭjuĝoj kaj pro la sistemo, kiu neas ĉies bonvolon. Krome, al tio aldoniĝas la malvasta teorio pri la libereco difinita per "faru, kion al ci plaĉas".
B. - Ĝi tamen estas plibona ol la teorio difinita per : "faru, kion ci devas fari" ; estas tio, kion diras la pastroj : la perfekta libereco estas servi la Eklezion. Aŭ Hegel : la perfekta libereco estas obei la Ŝtaton. Persone, mi preferas la humanan nocion liberecoplenan : "faru, kion al ci plaĉas".
M. - Ci difinis la liberecon kiel la plenan realiĝon de la eblecoj ekzistantaj en la homo. Jen estas io pli proksima al la socialismo : la socialista estaĵo estos libera, kiam la homo estos transformita.
B. - Sed se ne estas permesite al la homo disvolviĝi, la plejbono en li ne povos sin manifesti.
M. - Per burĝaj kaj liberalaj terminoj ci estas perfidanta cian liberalan burĝan filozofion. Sed ĉu tion ne diras Adam Smith kaj liaj satelitoj ? Forlasu la homojn al si mem, kaj ili liveros, kion ili havas plej bonan : kio konkretiĝas en

la fama frazo : "Vi lasu fari..."
B. - Ĉiam ci volas ignori la fakton, ke la liberaluloj alkroĉiĝas al la privata proprieto kaj al la ekonomia konkurado, dum mi pretendas, male, ke ĉio devas fariĝi komunaĵo.
M. - Sed se ci deiras de la principo laŭ kiu ĉiu homo devas kalkuli kun sia propra kaj karega privata rajto pri nereduktebla libereco, ci atingos la konkludon, ke ĉiam estos homoj, kiuj volos ion forpreni el la komuna posedaĵo, ĝin postulante kiel sian. Vi ne povas havi la plenan individuan liberecon sen postuli la individuan proprieton. Kion vi respondus al la homo, kiu postulus la proprietrajton ? Kaj kion vi farus, nehavante ŝtaton aŭ alian aŭtoritatan socialistan instrumenton, kapablan bridi la spitemulojn kaj kontraŭsociulojn ?
B. - Sed ci mem, Marks, asertis, ke la socialista homo estus ŝanĝita, ke li forlasus siajn egoistajn impulsojn kontraŭnaturajn kaj la kutimojn hereditajn el la burĝa socio.
M. - Socialista homo MIA estos transformiĝinta, Bakunin, sed neniel agnoskas mi socialistan homon CIAN. Ci konceptas la homojn kiel individuojn, ĉiu el ili havanta sian imperieton el rajtoj. Mi, male, pensas pri la homaro en sia tuto. La libereco, kiun mi konceptas, estas la liberiĝo de la homaro, kaj ne la individua libereco.
B. - Ĝi estas ankoraŭfoje la vidpunkto de Hegel pri libereco : Libere agi signifas morale agi, kaj morale agi signifas agi en akordo kun la ŝtatopravo.
M. - Hegel ne eraris. Nur prudenta estaĵo povas esti libera, ĉar nur prudenta estaĵo povas decidi antaŭ alternativo. Neracia elekto ne estas libera decido. Libere agi estas racie agi, kaj racie agi implicas la konon pri la naturaj kaj historiaj necesoj. Ververe, ne estas antitezo inter neceso kaj libero.
B. - Ni ne estas diskutantaj pri la libera volo, Marks, ni parolas pri la politika liber-

eco. Kuŝas en tio nenia metafizika komplikaĵo. La politika libereco dependas de la forigo de la politika premo, kaj ne necesas esti inicita pri filozofio por konstati tiun evidentaĵon. Naŭjara infano povas observi la mondon kaj distingi la premanton de la premato.

M. - Kaj naŭjara infano povus ankaŭ supozi, ke la situacio ne abrupte solviĝus per forigo de la ŝtato. Li povus egale konvertiĝi al anarkiismo, sed, se konsideri lian aĝon, oni facile pardonus al li... tiun frenezaĵon.

B. - Ekzistas filozofia frenezo samkiel ekzistas infaneca frenezo. Cia tuta abstrakta rezonado pri la libereco povas konduki nur tien, kie finvenis Rousseau kaj Hegel : al la konvinko ke la homoj povas esti liberaj laŭordone.

M. - Tio estas vera, ni povas devigi la homojn esti liberaj, nome ilin devigi racie agi, aŭ ĉiaokaze ni povas eviti, ke ili malracie agu.

B. - Trudita libereco ne estas inda je tiu nomo.

M. - Gravas la realo, ne la homoj.

B. - Nu, jen estas la realo ! Se ci konsentas devigi la homojn esti liberaj, ci devige pensas pri du klasoj de individuoj : tiuj, kiuj trudas kaj tiuj, kiuj subiĝas. Ni do estas en la ĉeesto de du homaj tipoj, kiuj konsistigas la supozitan senklasan socion de la aŭtoritata socialismo : la regantoj kaj la regatoj, tiuj, kiuj tronas supre, kaj tiuj, kiuj estas sube.

M. - Hipoteze, iuj homoj devas esti superaj al aliaj. Nu, mi ripetas, socialista socio devas esti reglamentita, precipe en la komenco. La alternativo estas jena : la Babelturo, mondo en kiu neniu scias kion fari aŭ esperi, senorda kaj sensekura mondo ; aŭ la fido pri stabila ordo. Anarkio signifas ĥaoson, kaj ĥaoson mi abomenas. La ĥaoso cin allogas, Bakunin, ĉar cin impresas la volupta ĉarmo de la bohemianismo. Post cia junaĝa rigida vivo en la sino de privilegiita familio kaj en militistaj lernejoj, oni komprenas, ke la malordo ŝajnas al ci alloga.

B. - Ci parolas, Marks, pri "vulgara socialismo", sed ci mem havas vulgaran nocion pri anarkiismo. Por la nepreparitaj spiritoj la termino "anarkio" signifas precize ĥaoson kaj malordon, sed instruita homo devas scii, ke tiu vorto estas fonetika traduko el la greklingvo, kiu simple signifas opozicion al la registaro. Kredi, ke foresto de registaro egalas ĥaoson kaj malordon estas pura superstiĉo. Nuntempe la plej ordigitaj nacioj en Eŭropo ne estas tiuj, en kiuj la registaro plej forte pezas sur la civitanoj. Male, estas tiuj, kie tiu trudado estas sensignifa. Mi ne komprenas, kion ci volas diri parolante pri bohemianismo. Mi tute ne sentas min allogata de la malordo.
M. - Ci flamece parolas pri sango, fajro, detruo.
B. - Pura fervoro por la batalo. Mi estas eble pli senpacienca ol ci pri la alveno de la revolucio, sed mi asertas al ci, ke la anarkiistoj, samkiel ci, arde deziras la starigon de socialista ordo.
M. - Tia deziro estas superflua, ĉar ekster la Ŝtato ne estos ordo. Via revolucio alportos nur masakrojn kaj ruinojn, neniom pli.
B. - Kaj ciaspeca revolucio, Marks, lasos al ni ion ja pli malbonan : la sklavecon.
M. - Nu, amiko mia, mi opinias, ke bona afero estas, ke ni ambaŭ estas persekutataj de la burĝaro. Alimaniere, pludaŭrigante ĉi tiun babiladon, ni povus, ci kaj mi, ĉesi esti socialistoj.
B. - Mi iras serĉi iom da bolanta akvo. La teo malvarmiĝis.

fino

---

Directeur de publication & imprimeur : Baudé 47340 Laroque